

Humuraj tekstoj el La Kancerkliniko
Radioprelego de Claude kaj Andrée GACOND, SRI 475, 1981.04.30 & 05.02

Cl.- Parolas nome de Svisa Radio Internacia gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond.

La revuo LA KANCERKLINIKO jam per sia titolo ne estas ordinara periodaĵo. Politika ĝi estas en Esperantujo antaŭ ĉio aprezanta neŭtralecon. Kaj ankaŭ kultura. Sed antaŭ ĉio ĝi estas humura gazeto. Hodiaŭ ni iom ridu tralegante artikolojn el la numeroj 16 kaj 17.

A.- Mi konis delonge tiun knabinon, kaj sciis pri ŝiaj beletraj gustoj, sed mi antaŭe neniam estus imaginta, ke post la ricevo de la ĵus eldonita "Katalogo de la libroservo de Universala Esperanto-Asocio (en konsultaj rilatoj kun Unesko)", ŝi restus dum longaj tagoj antaŭ tiu libreto, ŝajne ŝvebanta pro plezuro.

C1.- Mi mem havis la okazon tralegi tiun libreton, kaj mi agnoskas, ke mi konstatis nenion aparte rimarkindan, krom la mirinda reklamo por "La Kancerkliniko".

A.- Mi atentege observis ŝin, kaj konstatis, ke la libro estis ĉiam malfermita je la paĝoj 169-176-aj. Temis pri la rubriko "Miksita literaturo"!

Cl.- Strange!

A.- Mi vane serĉis la kaŭzon de tiu stranga fenomeno, sed nenion trovis ĝis kiam mi ricevis mian unuan mendon de tiu libroservo; la ludo vorto-mozaiko, paĝoj 274, 8.40 guldenoj.

C1.- Ĉar tiam mi komprenis fine la ekzaktan signifon de la vortoj "miksita literaturo"! Vi prenu ĉiujn literojn, vi ĉion miksu, kaj provu rekomponi kompreneblan frazon.

A.- Tiam mi komprenis la strangan malsanon de la knabino: la Katalogo de La Libroservo de Universala Esperanto-Asocio (En konsultaj rilatoj kun Unesko) fariĝis tute nature la Taga loko de la Liversorbo de opia Enu-Lasciva serena sorto (nukskuan jurkonstaton jolile)!

C1.- Verŝajne, kelkaj atentaj legantoj rimarkos, ke tute ne estas la "taŭga loko por mirinda ŝipo kiel Jolo, sed mi ne trovis alian eskapilon por ne droni!

A.- Ĉar miksita "literaturo" fariĝis "tuterarilo"!

Cl.- Post tiu malkovro de Silono, ni iru al malpli neŭtrala temo per artikolo subskribita La Papuo :

A.- P.P.P.P.P.P., kio signifas Profundaj Pensoj Pri Papa Pia Promeno.

C1.- En nia lando promenis pia bando.

A.- Vizito sen vizo, per niaj devizoj.

Cl.- Papilie, la pap-avio alflugis al la pap-haveno, kiu ĝojis pri la papa veno.

A.- Sen pipa gusto, sed kun gesta pepo, la papa gasto, kun pia ĉapo, kiel ĉia papo, benis pope la ĉeestantajn pupojn, kiujn ravis tiu kara beno.

C1.- Kaj la klaĉa papo, kun plaĉa kapo, paroladis papage pri siaj agoj, la pap-agoj.

A.- Kaj modeste - ĉar mod' estas - la papo rakontis pri sia avo, la pap-avo, simpla ĝardenisto kiu tre ŝatis la papavojn.

C1.- En tiu tempo oni respektis tradiciojn, kaj vendrede manĝis fiŝon, ĉefe gadon, konsekritan dum la gadmeso.

A.- Hodiaŭ ne plu temas pri reva fasto, sed pri rava festo: eĉ nia papo, kiu ne estas pia napo, ŝatas frandi delikatajn konkojn, precipe mar-mitulojn, kiuj dum kuirado iĝas marmit-uloj; ilin lavas la kardinaloj, fakuloj pri konk-lavo.

Cl.- Feliĉe ke neniu anarĥiisto ĵetis bombon sur la papon; la eksplodo kovrintus la straton per paj-eroj !

A.- Fine, oni deziru, ke tiu blanka sutano montriĝu en nigra Sudano, kaj ke tiu granda papo vojaĝu al Tahito, kaj vizitu Papeton.

Cl.- Kaj nun ni legu al vi erojn el "Letero el Irano", kiun sendis Abdelzamen Hofulah:

A.- "Pri kio mi povus verki? Ĉi tie la vivo estas pli trankvila ol en la Centra Oficejo de UEA, ĉar ni eĉ ne bezonas ŝajnigi, ke ni laboras.

Cl.- La nura evento de la pasinta monato estis la kunveno de nia kabula Esperanto-klubo "La estonto estos CIA" (Lastatempe ni tiel ŝanĝis la nomon de nia klubo, por montri nian apogon al la konata usona help- organizaĵo por evolulandoj, kiu nuntempe okupiĝas pri nia lando).

A.- Ĝin partoprenis ankaŭ mia kuzo. Temas pri tiu kuzo, pri kiu mi diris en la pasinta letero, ke li konas la anglan. Tio en si mem ne estus malbona, se li ne informiĝus regule pri la mondaj okazaĵoj pere de la dissendoj de BBC. Tiuj dissendoj multe influas lin plurilate...

C1.- Li rakontis al ni pri la lastaj novaĵoj kaj informis nin, ke dum pluraj semajnoj BBC kaj ĉiuj okcidenteŭropaj amas-komunikiloj dediĉis sian tutan energion, tempon kaj paperon por raportoj pri tre gravaj eventoj okazantaj en Pollando ĉirkaŭ Gdansko.

A.- Mi kaj la ceteraj klubanoj unue pensis ke temas pri starigo de nova aŭtobuslinio por pollingvaj esperantistoj "laŭ la spuroj de Zamenhof kaj reen", sed evidentiĝis ke temas pri striko de polaj neesperantistoj, kiuj postulas viandon kaj sindikaton.

Cl.- Certe tio parte ŝuldiĝas al la pola individuismo, ĉar kiel nun mi fin-fine komprenis, la lando mem nomiĝas Pola Po-pola Respubliko, tio estas: ĉiu polo estas aparta respubliko en si mem.

A.- Tiu sovieta esperantisto, Isa Izmajloviĉ Muhamedjev, kiu nun regule partoprenas niajn kunvenojn, komentis ke laŭ li tio ŝuldiĝas ankaŭ al la fakto ke poloj ne sufiĉe aŭskultas Radion Moskvo, kiu ĉiutage klarigas, ke en Pollando viando abundas.

C1.- "Tiuj damnaj poloj fidas pli je la regalo ol je Radio Moskvo! Evidente ili nenion komprenis pri internaciismo" konkludis nia soveta samideano.

A.- Laŭ fidindaj statistikoj la strikantoj ricevis saman kvanton da salut-atestoj, kiom ricevas Universala Kongreso de Esperanto (plus la papo, minus la ĝenelara direktoro de Unesko).

Cl.- Pluraj okcidentanoj eĉ remalkovris la devizon pri la neceso "morti pro Gdansko" por defendi la eternajn valorojn de la okcidenta kristana civilizo (Sed ankaŭ mia kuzo devis agnoski ke verŝajne temas pri nura retorikaĵo; la uzantoj de tiu devizo ne pli pretas agi laŭ ĝi ol urbestro, kiu promesas "paroli al vi en Esperanto dum via venonta kongreso")....

A.- Fine de la parolado de mia kuzo la plej inteligenta klubano starigis la kernan demandon: "Ĉu estas pli ĝuste diri **morti pro Gdansko** aŭ **morti por Gdansko**?", kaj tiam la debato ekhavis emocian svingon kaj viglan partoprenon.

C1.- En LA KANCERKLINIKO No 16 kaj 17 vi trovos abundon de tiaj pli malpli politikaj humuraĵoj, iom pripensigaj, ĉu ne? Almenaŭ maloftaĵoj en la esperanto-gazetaro, enhance kaj stile ĝenerale tiom neŭtrala.

A.- Vi aŭdis elsendon de Svisa Radio Internacia. Gesinjoroj Claude kaj Andrée Gacond atentigis pri la originaleco de la politika kaj kultura revuo en esperanto LA KANCERKLINIKO. Ĝis reaŭdo !

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), aŭgusto 2012*